

Tutmonda Biblioteko je la memoro de L. Tolstoj.

№ 2

# UNU ANIMO EN ĈIUJ.

KUNMETIS

**L. TOLSTOJ.**

*El la rusa lingvo esperantigis*

*Anna Ŝarapov.*

ELDONO № 1017 DE LA FIRMO

„POSREDNIK“ (PERANTO).

ОДНА ДУША ВО ВСѢХЪ. Льва Толстого.

ВЪ ПЕРЕВОДѢ НА ЭСПЕРАНТО.

Изданіе „ПОСРЕДНИКА“.

Moskvo. 1912.

Tiu ĉi esperanta serio estas redaktata de d-ro N. Kabanov.

## POR KIO ESTAS ELDONATA „TUTMONDA BIBLIOTEKO JE LA MEMORO DE L. TOLSTOJ".

„Unu animo en ĉiuj"—vere diras L. Tolstoj. Tial ĉefa tasko de homa vivo estas ĉiam pli granda frata unuiĝo de homoj, de gentoj kaj de popoloj kaj, plue, unuiĝo de ĉio vivanta sur la tero.

Nia eldona firmo „Posrednik" (Peranto), kiu estas fondita de L. Tolstoj en 1885 jaro, kaj kiu nun estas esperantia entrepreno, starigis kiel sian taskon eldonadon de libroj, disvastigantaj ideojn de la frata unuiĝo de homoj kaj de ĉio vivanta en mondo. Pro tio, ke la internacia lingvo Esperanto estas kreita nome por tia celo de la unuiĝo de homoj de ĉiuj gentoj kaj popoloj, nia eldona firmo nun komencas eldonadon de libroj en lingvo Esperanto.

Plej alta, plej ĝojiga unuiĝo de homoj estas unuiĝo en komunaj sentoj de frateco, de amo, de heroa kaj modesta ĉiutaga sindonemo, de kompatemo rilate al ĉiuj vivaj estaĵoj, de frata kunhelpado kaj kunlaborado de homoj por komuna bono. Pro tio libroj de esperanta fako de nia eldona firmo estos celantaj ĉefe disvastigadon de tiuj ĉi sentoj, de tiuj ĉi ideoj.

Serio de niaj esperantaj eldonaĵoj estas nomata „Tutmonda Biblioteko" kaj estas dediĉita al la memoro de nia amiko Lev Nikolaeviĉ Tolstoj, granda predikanto de la unuiĝo de ĉiuj vivoj en mondo.

Komencante tiun ĉi aferon, ni forte esperas subtenadon de ĉiuj, kunsentantaj al la afero. Tiu ĉi subtenado povas esprimiĝi en komunikadoj al ni de verkoj kaj de artikoloj, presitaj en iaj ajn lingvoj kaj plej konformantaj al la fundamentaj ideoj de „Tutmonda Biblioteko", kaj en helpado de kiel eble plej vasta disvastigado de libretoj de „Tutmonda Biblioteko" en ĉiuj landoj, kie estas uzata la lingvo Esperanto.

Amikoj en ĉiuj landoj! akceptu saluton de nia frata amo. Ni laboru amike kune por komuna sankta al ni celo.

Ĉefa redaktoro-eldonanto de firmo „Posrednik"

I. Gorbunov-Posadov.

Moskvo, Arbat, 36.

Tutmonda Biblioteko je la memoro
de L. Tolstoj.

№ 2

# UNU ANIMO EN ĈIUJ.

KUNMETIS

**L. Tolstoj.**

*El la* ***rusa*** *lingvo esperantigis*
*Anna Ŝarapov.*

ELDONO DE LA FIRMO
„POSREDNIK" (PERANTO).
№ 1017.
Moskvo, 1912.

Tiu ĉi esperanta serio estas redaktata de d-ro N. Kabanov.

## ANTAŬPAROLO.

La pensoj de tiu ĉi kolekto apartenas al plej diversaj aŭtoroj komencante de bramana, konfuciana kaj buddana literaturoj kaj finante per la Evangelio, Epistoloj kaj multaj, multaj antikvaj same kiel novtempaj pensuloj. La plimulto de tiuj ĉi pensoj, dank'al tradukoj aŭ refaro estis tiel ŝanĝitaj, ke mi opinias malkonvena subskribi ilin per la nomoj de iliaj aŭtoroj. La plej bonaj el tiuj nesubskribitaj pensoj apartenas ne al mi, sed al plej grandaj saĝuloj de la mondo.

L. Tolstoj.

## Unu animo en ĉiuj.

Ĉiuj vivantaj estaĵoj per siaj korpoj estas apartigitaj unu de alia, sed tio, kio ilin vivigas, estas la samo en ĉiuj.

### I.

### La konscio pri la dieco de l'animo unuigas la homojn.

**1.** La instruado de Kristo malkaŝas al homoj, ke en ĉiuj ili vivas la sama spirita Principo kaj ke ili ĉiuj estas fratoj; per tio ĝi kunigas ilin por ĝoja komuna vivo.

Lamennais (Lamné).

**2.** Ne sufiĉas diri, ke en ĉiu homo estas animo, simila al mia: en ĉiu homo vivas tio sama, kio vivas en mi. Ĉiuj homoj estas disigitaj unu de alia per siaj korpoj, sed ĉiuj estas kunigitaj per la sola spirita Principo, viviganta ĉion.

**3.** Vivi en konsento kun homoj estas granda bono, sed kiel fari, por akordiĝi kun ĉiuj? Homoj estas tiom multaj, tiom diversaj. Nu, mi akordiĝos kun miaj familianoj, sed kun ceteraj kiel agi? Nu, mi unuiĝas

kun miaj amikoj, kun ĉiuj rusoj, kun ĉiuj samkredantoj. Sed kiel mi agos kun tiuj, kiujn mi ne konas, kun aliaj nacioj, kun alikredantoj? Multegaj estas homoj kaj ĉiuj—tiel diversaj; kion fari?

Estas nur unu rimedo: pensi pri tio, kiel unuiĝi kun la unuspeca spirita estaĵo, vivanta en mi kaj en ĉiuj homoj.

**4**. Pensante pri la milionoj kaj milionoj da homoj, vivantaj simile al mi, ie trans dek miloj da verstoj, pri kiuj mi neniam nenion ekscios kaj kiuj nenion scias pri mi, mi nevole demandas min mem: ĉu efektive ekzistas nenia kunligo inter ni, kaj ni mortos, ne koninte unu la alian? Tio ne povas esti. Vere, ĝi ne povas esti. Strange, sed mi sentas, ke ekzistas kunligo inter ni kaj ĉiuj homoj de la mondo, kaj vivantaj, kaj mortintaj. En kio konsistas la kunligo, mi ne povas nek kompreni, nek eldiri, sed mi scias, ke ĝi ekzistas.

**5**. Mi memoras, ke mi diris al mi, ke ĉiu homo havas multe da tre bona, kaj tre homama, sed samtempe multe da tre malbona kaj nebonvolema, — tial laŭ humoro de homo elmontriĝas jen unu jen alia. Ĝi estas tute vera.

La vidaĵo de aliulaj suferoj elvokas ne nur en diversaj homoj, sed ankaŭ en la sama homo ofte malsamajn sentojn: ian fojon kompaton, kaj alian—ion similan al plezuro, intensiĝanta iafoje ĝis plej kruela malico.

Observante min mem, mi rimarkis, ke al ĉiuj estaĵoj mi rigardas iafoje kun profunda kompato, alifoje kun plej granda indiferento kaj iamomente kun malamo kaj

eĉ malico. Ĝi klare montras, ke ni havas du diferencajn kaj tute malajn procedojn de ekkono: unu, kiam ni konsideras nin, kiel apartaj estaĵoj, kiam ĉiuj estaĵoj ŝajnas al ni tute fremdaj, kiam ili ĉiuj—ne mi. Kaj tiam ni ne povas senti al ili ion alian, krom indiferento, envio, malamo, malico. Sed ekzistas alia procedo de ekkono—per konscio de nia unueco kun ĉiuj. Dank' al tiu ekkonmaniero,—ĉiuj estaĵoj ŝajnas al ni la samo, kiel nia „mi", kaj tial ilia vidaĵo elvokas en ni amon.

Unua procedo de ekkono apartigas nin unu de alia per ne trabatebla muro, alia forigas la muron, kaj ni samiĝas. Unua procedo instruas nin ekkoni tion, ke ĉiuj aliaj estaĵoj diferencas de „mi", sed alia instruas tion, ke ĉiuj estaĵoj enhavas la saman „mi", kiun mi konscias en mi mem.

Ŝopenhaŭer.

**6.** Ju pli homo vivas por la animo, des pli li sentas sian unuecon kun ĉiuj junaj estaĵoj. Vivu por la korpo, kaj ci estos meze de fremduloj; vivu por la animo, kaj ci havos nur intimulojn.

**7.** Rivero ne similas al lageto, kaj lageto ne similas al barelo da akvo, kaj barelo ne similas al ĉerpilo kun akvo. Tamen kaj en lageto, kaj en rivero, kaj en barelo, kaj en ĉerpilo estas la sama akvo. Same—ĉiuj homoj estas diversaj, sed la spirito, vivanta en ili, en ĉiuj estas la sama.

**8.** Nur tiam homo komprenas sian vivon, kiam li en ĉiu homo vidas sin mem.

**9**. Parolu kun homo, rigardu atente en liajn okulojn, kaj ci sentos, ke ci estas lia parenco, ke ci lin kvazaŭ konis iam antaŭe, de longe. Kial—tia sento? Ĉar tio, dank'al kio ni vivas, estas la samo en ci kaj en li.

**10**. En ĉiu homo vivas tia spirito, kian nenio superas en la mondo, kaj, tial, sendepende de la situacio, kiun homo havas en la mondo, ĉu li estas grandsinjoro aŭ punlaborulo, episkopo aŭ almozulo,—ĉiuj estas egalaj, ĉar en ĉiuj vivas tio, kio superas ĉion en la mondo. Ŝati kaj estimi grandsinjoron pli, ol almozulon similas al tio, kiel ŝati kaj estimi unu oran moneron pli, ol alian, ĉar la unua estas pakita en blankan, la alia — en nigran papereton. Oni devas ĉiam memori, ke en ĉiu homo estas la sama animo, kiel en mi, kaj tial oni devas rilati al ĉiuj homoj egale, singarde kaj estime.

**11**. La esenco en la instruado de Kristo estas tio ke Li ĉiujn homojn konsideris kiel fratoj. Li vidis en homo fraton kaj tial amis ĉiun, kiu kaj kia ajn ĝi estas. Li atentis homojn ne laŭ laŭ ekstero, sed interno. Li ne ŝatis antaŭ ĉio la korpon, sed tra la ornamoj de riĉulo kaj la ĉifonoj de almozulo vidis senmortan animon. En plej malmorala homo Li vidis la kapablon, kiu povas tiun saman senmoraliĝintan homon estigi plej granda sanktulo, simila al Li mem.

Laŭ Ĉanning.

**12**. Infanoj estas pli saĝaj, ol plenaĝuloj. Infano ne atentas homojn laŭ titoloj, sed per la tuta animo sentas, ke en ĉiu homo vivas tio, kio estas la samo kaj en ĝi, kaj en aliaj homoj.

13. Se homo ne vidas en ĉiu proksimulo la saman spiriton, kiu kunigas lin kun ĉiuj homoj de la mondo,— li vivas kvazaŭ sonĝe. Nur tiu vekiĝis kaj vivas laŭvere, kiu en ĉiu proksimulo vidas kaj sin kaj Dion.

## II.

### La sama spirita Principo vivas ne nur en ĉiuj homoj, sed ankaŭ en ĉio vivanta.

1. Ni per koro sentas, ke tio, kio nin vivigas, kion ni nomas nia vera „mi",—estas la samo ne nur en ĉiu homo, sed ankaŭ en hundo, kaj en ĉevalo, kaj en muso, kaj en kokino, kaj en pasero, kaj en abelo, eĉ en kreskaĵo.

2. Se oni diras, ke birdoj, ĉevaloj, hundoj, simioj estas tute fremdaj al ni, kial do ne diri, ke sovaĝuloj,—nigraj kaj flavaj homoj estas fremdaj al ni? Kaj se oni konsideras tiujn homojn, kiel fremdaj — samrajte nigruloj kaj flavuloj povas konsideri blankulojn, kiel fremdajn. Kiu do estas proksimulo? Al tio ekzistas nur sola respondo: ne demandu, kiu estas proksimulo, sed faru al ĉio vivanta tion, kion ci deziras, ke oni faru al ci.

3. La vivantaro timas turmentojn; la vivanto timas morton; ekkonu cin mem ne nur en homo, sed en ĉiu vivanta estaĵo; ne mortigu kaj ne suferigu. Ĉio vivanta volas la samon, kiel ci; komprenu cin mem en ĉiu vivanta estaĵo.

Budda saĝeco.

4. Ne tial homo superas bestojn, ke li povas turmenti ilin, sed tial, ke li kapablas kompati ilin.

**5.** La kompato al ĉio vivanta estas plej necesa, por perfektiĝi en virto. La kompatemulo nek ofendos, nek insultos, sed pardonos. La bonulo ne povas esti ne kompatema. Kaj se homo estas maljusta kaj venĝema, — tia homo certe ne havas kompaton. Sen kompato al ĉio vivanta ne povas esti virto. Ŝopenhaŭer.

**6.** Oni povas malkutimiĝi sin de l'kompato al bestoj, propra al homoj. Oni vidas tion precipe dum ĉasado. Bonaj homoj, sin kutimigante al ĉasado, turmentas kaj mortigas la bestojn, ne rimarkante sian kruelecon.

**7.** La ordono „Ne mortigu" rilatas ne nur homon, sed ĉion vivantan. Tiu ĉi ordono estis gravurita en la koro de homo antaŭ ol oni ĝin gravuris sur ŝtonplato.

**8.** La homoj ne konsideras, kiel malbono, manĝi animalojn tial, ke oni kredigis al ili, ke Dio ĝin permesis. Ĝi ne estas prava. En kiaj ajn libroj estas skribite, ke oni ne faras pekon, mortigante animalojn kaj manĝante ilin, en la koro de homo estas skribite pli klare, ol en kiaj ajn libroj ke animalojn oni devas kompati kaj oni ne rajtas mortigi ilin same, kiel homojn. Ni ĉiuj scias tion, se ni ne silentigas en ni la konsciencon.

**9.** Se nur ĉiuj manĝantoj de animaloj mem mortigadis ilin, la plej granda parto de homoj ĉesus manĝi la viandon.

**10.** Ni miras pri tio, ke estis, kaj ankoraŭ nun estas homoj, mortigintaj homojn, por manĝi ilian viandon. Sed venos tempo kaj niaj nepoj miros pri tio, ke iliaj pra-

patroj mortigadis ĉiutage milionojn da animaloj, por manĝi ilin, kvankam oni povis bonguste kaj samprofite, sen mortigo, nutriĝi per fruktoj de l'tero.

**11.** Oni povas sin malkutimigi de kompato eĉ por homoj kaj oni povas sin kutimigi al kompato eĉ por bestoj. Ju pli da kompato havas homo, des pli bone estas por lia animo.

**12.** Ke io sama estas en ni, ĉiuj homoj, — ni vive sentas; ke tio sama estas ankaŭ en la bestoj, ni jam ne tiel vive sentas. Ankoraŭ malpli ni sentas ĝin en la insektoj. Sed pripensu nur la vivon de tiuj ĉi estaĵetoj, kaj ci sentos, ke la samo vivas ankaŭ en ili.

**13.** „Sed ĉu ni ne devas mortigi muŝojn, pulojn? per ĉiu nia movo ni nevole pereigas la vivon de l'estaĵoj, ne rimarkeble por ni", tiel oni diras ordinare, kredante, ke tio pravigas la kruelecon de l'homoj por la animaloj. Tiaj parolantoj forgesas, ke homo je nenio povas atingi la perfektecon. La homo devas nur celadi al perfektiĝo. La samo montriĝas rilate la kompaton por animaloj. Ni ne povas vivi, ne kaŭzante morton de aliaj estaĵoj, sed ni povas esti pli-malpli kompatemaj. Ju pli kompatemaj ni estos al ĉiuj animaloj, des pli bone sin sentos nia animo.

## III.

### Des pli bone estas la vivo de homoj, ju pli klare ili konscias la unuecon de tiu dieca principo, kiu vivas en ili.

**1.** Al homoj ŝajnas, ke ili ĉiuj estas apartigitaj unu de aliaj. Kaj tamen, se efektive ĉiu homo vivus nur sian

apartigitan de ĉiuj vivon, — la vivo de homoj ne povus daŭri. La homa vivo estas vivebla nur dank' al tio, ke en ĉiuj homoj vivas la Sama spirito Dia, kaj ke ili scias tion.

**2.** Iuj homoj pensas, ke vivas laŭvere sole ili, ke ili estas ĉio, kaj la ceteraj—nenio. Kaj tiaj homoj estas multaj. Sed oni trovas ankaŭ tiajn homojn, prudentajn kaj bonajn, kiuj komprenas, ke la vivo de aliaj homoj kaj eĉ bestoj estas same grava por si mem, kiel ilia vivo. Tiaj homoj vivas ne en sia sola „mi“, sed ankaŭ en aliaj homoj kaj eĉ en bestoj. Al tiaj homoj estas facile vivi,—facile morti. Kiam ili mortas, en ili mortas nur tio, per kio ili vivis en si,—kaj tio, per kio ili vivis en aliaj, restas. Al tiuj, kiuj vivas nur en si mem, estas malfacile vivi kaj estos turmente morti, ĉar, mortante, tiaj homoj opinias, ke en ili mortas ĉio tio, kio ilin vivigis.

Laŭ Ŝopenhaŭer.

**3.** Memoru, ke en ĉiu homo vivas la sama spirito, kiu vivas ankaŭ en ci, kaj tial honoru, kiel sanktaĵo, kaj cian animon, kaj la animon de ĉiu homo.

**4.** Kial ni sentas agrablon en nia animo post ĉiu afero de l'amo? Tial, ke ĉiu tia afero certigas nin pri tio, ke nia vera „mi“ troviĝas ne sole en nia persóneco, sed en ĉio vivanta.

Se oni vivas nur por si mem, oni vivas nur, kiel parteto de sia vera „mi“.

Male, se oni vivas por aliaj, oni sentas, kiel nia „mi“ fariĝas pli vasta.

Vivu nur por ci mem, kaj ci sentos cin meze de

malamikoj: ci sentos, ke ĉies bono malhelpas cian bonon. Vivu por aliaj, kaj ci sentos cin meze de amikoj, kaj ĉies bono fariĝos cia propra bono.

Laŭ Ŝopenhaŭer.

**5.** Sian feliĉon homo trovas nur en servado al proksimuloj, ĉar, servante proksimulojn,—li kuniĝas kun la spirito Dia, vivanta en li.

**6.** Tute komprenebla fariĝas al ni tiu dieca spirito, dank' al kiu ni vivas nur tiam, kiam ni amas la proksimulojn.

**7.** Ĉiu vera bona ago, kiam homo forgesas sin mem kaj pensas nur pri la bezono de aliulo, estus ago miriga kaj neklarigebla, se ĝi ne estus tiel natura kaj kutima al ni. Efektive, kial homo senigos sin de io, sin maltrankviligos, turmentiĝos ne por si mem, sed por homo, kiun li ne konas? Klarigi tion oni povas nur tiel, ke tiu, kiu faras bonon ne al si, sed al aliaj, scias, ke tiu, al kiu li faras bonon, ne estas estaĵo, aparta de li, sed la sama estaĵo, kia li estas, nur aliaspekta.

Laŭ Ŝopenhaŭer.

**8.** Ĉion, kion ni ekkonas, ni ekkonas aŭ per niaj kvin sentoj aŭ per tio, ke ni vidas, aŭdas, palpas objektojn aŭ per tio, ke ni nin transportas en aliajn estaĵojn, vivas per ilia vivo. Se ni konus objektojn nur per kvin sentoj, la mondo estus al ni tute nekomprenebla. Tio, kion mi scias pri la mondo,—mi scias sole dank' al tio, ke mi povas per amo nin senti en aliaj estaĵoj kaj vivi ilian vivon. La homoj per siaj korpoj

estas disigitaj kaj ne povas kompreni unu la alian. Sed la amo kunigas ilin ĉiujn. Kaj en tio estas granda bono.

**9.** Se ci vivas spiritan vivon, ci ĉe ĉiu apartiĝo de homoj sentas spiritan suferon. Kion signifas tia sufero? Jen kion: simile al tio, kiel korpa doloro montras danĝeron, minacantan la korpan vivon,— tia spirita sufero montras danĝeron, minacantan la spiritan vivon de homo.

**10.** Hinda saĝulo diris: „En ci, en mi, en ĉiuj estaĵoj vivas la sama spirito de la vivo, kaj ci koleras kontraŭ mi, ne amas min. Memoru, ke mi kaj ci estas la samo. Kiu ajn ci estas, en ci kaj mi vivas la samo“.

**11.** Kiom ajn malbona, maljusta, malsaĝa, malagrabla estas homo,— memoru, ke, ĉesante lin estimi, per tio ci rompas sian interligon ne nur kun li sola, sed kun la tuta spirita mondo.

**12.** Por ke estu facile vivi kun ĉiu homo, pensu pri tio, kio cin unuigas, sed ne pri tio, kio cin disigas de li.

**13.** Oni opinias granda nepardonebla peko mokegi objektojn de ekstera adorado de homoj, kaj oni ne opinias, kiel peko, mokegadon kontraŭ homo. Kaj tamen, en homo, en la plej malmorala, vivas tio, kio superas ĉion manfaratan: ĉiuj objektoj de ekstera adorado estas nur manfaritaĵoj de homoj.

**14.** Facile estas suferi ĉagrenon, kiam ĝi venas ne de homoj, sed de malsanoj, superakvegoj, tertremoj. Sed precipe dolore estas al homo, kiam li suferas pro malbonvolo de homoj, de fratoj. Li scias, ke homoj devus lin ami, kaj jen, anstataŭ tio, ili lin turmentas.

„Homoj, ĉiuj homoj estas ja la samo, kiel mi“, pensas tia homo. Kial do ili turmentas min? Pro tio estas pli facile suferi ĉagrenon de malsanoj, bruloj, kampaj sekiĝoj, ol de nebonvolemo de homoj.

## IV.

### Kio rezultas el konscio pri la unueco de l'animo en ĉiuj homoj.

1. Ĉu ni komprenas nian spiritan kunfratecon? Ĉu ni komprenas, ke la sama dieca Principo vivas en la animoj de ĉiuj homoj same, kiel en nia animo? Ne, ni ankoraŭ ne komprenas tion. Kaj tamen ĝi sola povas doni al ni veran liberecon kaj bonon. Ne povas esti kaj ne estos libereco kaj bono, ĝis kiam homoj ne komprenos sian unuecon. Kaj tamen, se nur homoj konfesus tiun fundamentan veron de la kristanismo—la unuecon de la spirita principo en homo — la tuta vivo de homoj ŝanĝus kaj stariĝus inter ili tiaj rilatoj, kiajn ni ne povas imagi al ni. Tiam ofendoj, ĉagrenoj, ĝenoj, kiujn ni nur faras al homoj — fratoj, ne rimarkante ilin, indignigus nin pli forte, ol nunaj plej grandaj krimoj. Vere, ni bezonas novan revelacion ne pri paradizo kaj infero, sed pri tiu spirito, kiu vivas en ni.

2. Se homo volas distingiĝi de aliaj per riĉeco, honoro, rangoj—tiaokaze neniaj gloriĝoj kontentigos lin: li neniam estos trankvila kaj ĝoja. Sed, kompreninte, ke en li vivas tiu dieca principo, kiu vivas en ĉiuj homoj—li tuj iĝos trankvila kaj ĝoja, en kiu ajn situacio

li estas, ĉar li komprenos, ke li posedas ion plej superan en la mondo.

**3**. Ju pli vivas homoj, des pli ili komprenas, ke ilia vivo estas nur tiam vera kaj feliĉa, kiam ili ekkonas sian unuecon per la sama spirito, vivanta en ĉiuj.

**4**. Amo elvokas amon. Kaj tio ne povas esti alie, ĉar Dio, elmontriĝinte en ci, elmontras Sin ankaŭ en alia homo.

**5**. Bone estas, renkontante ĉiun homon, kvankam li ŝajnas plej malagrabla kaj abomena al ci, rememori, ke tiu homo ebligas cin interrilatiĝi kun la spirita Principo, vivanta en li, en ci kaj en la tuta mondo, kaj tial ci devas ne plendi kontraŭ tia interrilatigo, sed esti danka pro tio, ke ci havas tian bonon.

**6**. Branĉo, fortranĉita de sia tubero, per tio apartiĝis de la tuta arbo. Tiel same homo, malpacanta kontraŭ alia homo, apartiĝas ankaŭ de la tuta homaro.

Sed branĉo estas fortranĉata de fremda mano, kaj homo mem per sia malamo sin fortranĉas de sia proksimulo kaj ne pensas pri tio, ke tiamaniere li apartigas sin de la tuta homaro.

Marko Aŭrelio.

**7**. Ne ekzistas tia malbona ago, pro kiu estus punita nur farinto. Ni ne povas nin tiel izoligi, ke la malbono, entenata en ni, ne tuŝu aliajn homojn. Niaj agoj, kaj bonaj, kaj malbonaj, similas al niaj infanoj: ili vivas kaj agas jam ne pro nia volo, sed per si mem.

Dĵorĵ Elliot.

8. La vivo de l'homoj estas peniga nur pro tio, ke ili ne scias, ke la animo, vivanta en ĉiu el ili, vivas ankaŭ en ĉiuj homoj. De tio venas malpaco inter homoj; dank' al tio, unuj estas riĉaj, aliaj — malriĉaj, unuj — mastroj, aliaj — servistoj; tio naskas la envion kaj venĝemon, pro tio aperas ĉiuj turmentoj de homoj.

9. Homa korpo deziras bonon sole al si, kaj homoj estas delogataj per tia trompo. Kaj se homo vivas sole por sia korpo, ne por la animo, li disiĝas de homoj kaj de Dio; li ne ricevas la bonon, serĉatan de li.

Kunmetis L. Tolstoj.

---

Тип. Т-ва И. Н. КУШНЕРЕВЪ и Ко. Москва.
1912.

# МЕЖДУНАРОДНЫЙ ЯЗЫКЪ.
## Internacia lingvo.
## ВЪ ИЗДАНІИ „ПОСРЕДНИКА".

---

1) **Н. Кабановъ.** Вспомогательный международный языкъ эсперанто. Съ письмомъ Л. Н. Толстого объ языкѣ эсперанто. Цѣна **12** коп.

**N. Kabanov.** Internacia helplingvo Esperanto. Kun letero de L. Tolstoj pri la lingvo Esperanto. Prezo **12** sd.

2) **Н. Кабановъ.** Первая эсперантская книга для чтенія съ грамматикой и словаремъ. Второе изданіе. Цѣна **25** коп.

**N. Kabanov.** Unua esperanta legolibro kun gramatiko kaj vortaro. Dua eldono. Prezo **25** sd.

3) **Н. Кабановъ.** Полная грамматика эсперантскаго языка. Съ примѣрами, упражненіями и съ переводомъ упражненій на русскій языкъ. Цѣна **40** коп.

**N. Kabanov.** Plena gramatiko de la lingvo Esperanto. Kun ekzemploj, ekzercoj kaj kun rusa traduko de la ekzercoj. Prezo **40** sd.

4) **Л. Л. Заменгофъ.** Основы Международнаго языка Эсперанто. Второе изданіе. Цѣна **35** коп.

**L. L. Zamenhof.** La fundamento de la internacia lingvo Esperanto. Dua eldono. Prezo **35** sd.

5) **Н. Кабановъ.** Самый легкій языкъ—Эсперанто. Самоучитель эсперантскаго языка для дѣтей, юношества и для всѣхъ, начинающихъ его изучать. Цѣна **35** коп.

**N. Kabanov.** La plej facila lingvo — Esperanto. Memlernolibro de la lingvo Esperanto por infanoj, gejunuloj kaj por ĉiuj komencantaj lerni ĝin. Prezo **35** sd.

6) **Н. Кабановъ.** Краткій русско-эсперантскій словарь. Цѣна **40** коп.

**N. Kabanov.** Rusa-esperanta vortaro. Prezo **40** sd.

Продаются въ книжномъ магазинѣ „ПОСРЕДНИКЪ" (Москва, Петровскія линіи) и въ другихъ книжныхъ магазинахъ. Выписывать можно изъ главн. склада изданій „ПОСРЕДНИКА": Москва, Арбатъ, д. Тѣстовыхъ, **И. И. Горбунову.**

## ВСЕМІРНАЯ БИБЛІОТЕКА ВЪ ПАМЯТЬ Л. Н. ТОЛСТОГО.
## TUTMONDA BIBLIOTEKO JE LA MEMORO DE L. TOLSTOJ.

---

### *I. Tradukitaj de* ***A. N. Ŝarapov.***

**L. Tolstoj.** Dio unu por ĉiuj (Surata kafejo) (Богъ одинъ у всѣхъ.) Prezo 4 k. (5 sd.).

" Unu animo en ĉiuj (Одна душа во всѣхъ.) Prezo 4 k. (5 sd.)

" Unua ŝtupo, aŭ senmortiga nutrado. (Первая ступень.) Prezo 10 k. (11 sd.).

.......................

### *II. Tradukitaj de* ***N. Kabanov.***

**L. Tolstoj.** Dio vidas veron, sed ne baldaŭ diros. (Богъ правду видитъ.) Prezo 4 k. (5 sd.).

" Du maljunuloj. (Два старика.) Prezo 7 k. (8 sd.).

" Kie estas amo, tie estas Dio. (Гдѣ любовь, тамъ и Богъ.) Prezo 6 k. (7 sd.)

" Sieĝo de Sebastopolo. (Осада Севастополя.) Prezo 15 k. (17 sd.).

" Kaŭkaza militkaptito. (Кавказскій плѣнникъ.) Prezo 8 k. (9 sd.).

" Per kio homoj estas vivaj. (Чѣмъ люди живы.) Prezo 7 k. (8 sd.).

### *Estas presataj:*

**Naĵivin.** Pri kio steloj parolas. (О чемъ говорятъ звѣзды.)

**Garŝin.** Kvar tagoj sur kampo de batalo. (Четыре дня на полѣ сраженія.)

" Signalo. (Сигналъ.)

" Legendo pri fiera Ageo. (Сказаніе о гордомъ Аггеѣ.)

**Semjonov.** Kortisto (kun antaŭparolo de L. Tolstoj.) (Дворникъ.)

**L. Tolstoj.** Unua, dua, tria, kvara kaj kvina libretoj por infanoj. (Книжки для дѣтей).

---

Libroj estas vendataj en la librovendejo „Posrednik" (Moskvo, Petrovskija linii) kaj en aliaj librovendejoj. Por mendoj sin turni en la ĉefan librotenejon de la eldonoj de „Posrednik": Moskvo, Arbato, 36, d. Testov, al I. I. Gorbunov.

Выписывать изъ главнаго склада изданій „ПОСРЕДНИКА": Москва, Арбатъ, д. Тѣстовыхъ, **И. И. Горбунову.**

Цѣна **4** коп.

Тип. Т-ва И. Н. КУШНЕРЕВЪ и К°. Москва.